



Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, redakcioj de gazetoj kaj radiostacioj, listoj kaj unuopuloj.


EKO 2015-19 sendita la 16an de majo el Uppsala, Svedio

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

AMO 11: nova rigardo al informado

La celo estas krei pli sukcesajn varbilojn kaj strategiojn. Gvide al tio, ni spektis filmon el la serio TED pri sukcesa diskonigo de varoj aŭ ideoj. La prezentisto estis Simon Sinek, kiu skizis la ‘vend’-vicordon kutime uzatan: Kio, Kiel, Kial. Unue oni difinas la varon (fizikan aŭ idean), poste klarigas kiel oni uzas ĝin aŭ (en nia kazo), kiel oni eklernas la lingvon. Nur laste, se entute, oni prezentas kialojn por ekŝati la produkton. Sinek proponas inversigi la ordon, citante tri subtenajn kazojn: nome komencu per ‘KIAL’. Tio implicas scii KIAL oni mem uzas Esperanton kaj KIAL novuloj povus trovi ĝin inda.

Li proponas la modelon de la ora cirklo kun KIO ekstere, KIEL interne de tio kaj KIAL meze. Li argumentas, ke tio spegulas nian cerbo-strukturon. La ekstera KIO-nivelo respondas al la cerba parto, kiu okupiĝas pri racio kaj intelekto, kaj entenas la kapablon je lingvo. La plej interna kerno (KIAL) ne funkcias per lingvo sed per ideoj kaj mensaj bildoj; tie reagis emocioj, kaj en tiu loko oni formas decidojn surbaze de sentoj. Emociaj decidoj povas esti modifitaj per faktoj (KIO) kaj racio; sed plej efika varbado sukcesas tuŝi la emocian kernon. En postprezenta gruplaboro oni ricevis la taskon krei du varbilojn por iu celo, la unua eliras el la KIO, la dua per KIAL.



Dua prezentaĵo estis de David Logan, kaj temis pri la fenomeno de ‘triboj’, t.e. grupoj, kiuj formiĝas pro iu komuna intereso. Li skizis kvin nivelojn de triboj, kaj instigis la aŭskultantojn provi movi la tribanojn de ilia nuna nivelo al la sekva pli alta. La partoprenantoj multe diskutis, kiomgrade tiu modelo aplikeblas aŭ utilas por la Esperanta tribaro. La ĉefa kialo prezenti la modelon estis konsciigo, ke ni ĉiuj havas eblojn per niaj propraj sociaj cirkloj daŭre informi, ĉar ni ĉiuj apartenas al ‘triboj’ kie homoj jam aŭskultas nin. Tio donas eblojn ekster la kelksekunda intervalo, kiun ni havas por kapti la intereson de eksteruloj.

La tria prezento estis certe la plej amuza, tamen fine havis seriozan mesaĝon. Temis pri la ligo inter sukceso kaj feliĉo. Konvencia saĝo postulas, ke oni luktas por atingi sukcesan rezulton, kaj tio devas doni feliĉon (aŭ almenaŭ kontentigon). Vivsperto montras, ke tiel malofte okazas. Post unu sukcesa atingo, oni tuj strebas al pli alta atingo kaj restas nekontenta. Vendagentoj

plenuminte la monatan kvoton, sekvamonte ricevas pli altan kvoton. Shaun Achor multe esploris feliĉon, kaj trovis, ke 90% de longdaŭra feliĉo ne estas decidita de la ekstera mondo, sed de la maniero en kiu la cerbo traktas la informojn. Li citis neŭrologiajn rezultojn, por klarigi kial menso kiu spertis (aŭ liveris) feliĉon, fariĝas multe pli kapabla efike labori, esprimi kreivon kaj problemsolvi. Alivorte, la vicordo ne estu SUKCESO → FELIĈO, sed inverse: FELIĈO → SUKCESO. La seminarianoj multe diskutis, kiel konstrui komence de esperanta kunsido aŭ laborsesio feliĉan, pozitivan etoson.



Sten Svenonius esprimas starpunkton, aŭskultas dekstre seminariano veninta el Francio.

Partoprenis en la seminario dekkvino da homoj, el kvar landoj. Fotoj: Olof Pettersson.

La plej grandan tempon seminarianoj dediĉis al la ideoj de Sinek; en la du kestoj kelkaj konkludoj el la etgrupaj laboroj:

Varbilo, kiu eliras el KIAL:

- Eblo ricevi novaĵojn rekte, preter formalaj, filtritaj kanaloj
- Pasporto al internacia amikeco
- Perilo por kultura egaleco
- Justigo kaj efikigo de komunikado por transnaciaj movadoj
- Faciligi tutmondan inteligenton
- Profunda interhoma kultura kontakto
- La lingvo apartenas al ĉiu uzanto, ne al difnita nacio aŭ kulturo
- Liberaj interhomaj kontaktoj
- Justeco: lingvo por ĉiuj, libervole elektita
- Esperanto estas mapo por lingvolernado
- Esperanto donas pli da tempo por enhavo, ne nur lingva formo.

Varbilo, kiu eliras el KIO kaj KIEL:

- Komencas per Zamenhof, 1887, La Unua Libro...
- Klarigas la logikan strukturon, modulecon, tradvideblon...
- Prezentas movadajn instancojn, eventojn: UEA, UK, LA, FA, IJK, Pasporta Servo...
- Donas informojn pri kurso, kie eblas eklerni la lingvon.

Se oni povas havi informojn pri la celpubliko, eblas elekti la plej trafajn argumentojn. Se ne, oni devas prezenti pli vastan gamon.

Maldekstre vi trovas proponitajn argumentojn:



Mezgvide Stella Lindblom, estrarano de SEF; maldekstre en la komputila ekrano Simon Sinek, dekstre en la reala vivo Stefan MacGill, prizorganto de la AMO-programo ĉe UEA.

Rekomendoj (1-4 laŭ Sinek, 5 laŭ Achor):

- Analizu kial ni mem eklernis/ekuzis/ŝatas Esperanton.
- Imagu kial diversaj publikoj povas eklerni/ekuzi/ŝati Esperanton.
- Provu krei varbilojn kiuj uzas la vicordon: Kial, Kiel, Kio.
- Alportu mesaĝon, kiu kontentigos ne tiom nin, sed la celaton – tio implicas ekkoni ties motivojn kaj dezirojn.
- Pozitivigu la etoson antaŭ ol ekagi.

Plej fine la partoprenantoj estis petataj mem pripensi kaj prezenti etan ŝanĝon kiun ili mem volas fari por plibonigi nian komunan varbadon. La finvortoj temis pri tio kiu vere estas la aganto, ĉu organizo faru ion aŭ ĝiaj membroj. La organizoj estas nenio sen siaj membroj, kaj estas la etaj ŝanĝoj en la agado de la membroj kiuj pluevoluigas la movadon. Tiel Stella mem volis puŝeti la ‘tribon de la seminario’ etan paŝon al pli alta nivelo.

Verkis: SMG/Stella Lindblom; Vortoj: 795

La seminario okazis dum 24 horoj tra du tagoj, tuj antaŭ la nunjara Sveda Kongreso.

Seminarianoj Bengt Norlöf, Jadwiga Greger kaj Elvira Twardowska el Gdansko, Pollando, kie okazos la sekva Sveda Kongreso.

